# HEJS

BULTENO DE

HISPANA ESPERANTO ★ JUNULARA SEKCIO

Nro. 27

Novembro - Decembro 1962



REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY


POŜTKESTO 26

Arce, 8, 2.º, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo




*Jen le partoprenintoj de la ekskurso tra la montoj "Pola" kaj "L'Obach"*

I N D U S T R I A S L A G U N A



**Construcción de juegos de salón. Aparatos electrónicos y automáticos. Fábrica de bolas de futbolín, billarín, etc.**

Travesera de las Corts, 78 - Teléf. 239 22 85 - Barcelona-14

Per noteto oni indikis en nia lasta bulteno ke HEJS ne estis reprezentita en la I.J.Kongreso de TEJO ĉi-jare en Istad,Svedujo,ankaŭ ni rezignas nian partoprenon en la venonta kongreso,ĉar okazos en Bulgarujo,lando tro malproksima de ni.Pro tio kaj post longa estrara diskutado, oni akordis la jenon:

1 - Nia sekcio pagos al la membro kiu havos ebleoon partopreni en I.J. Kongreso, la restadon en la koncerna lando;(inkluzive:manĝaĵo,ekskursoj, aranĝoj en la I.J. Kongreso ktp.

2 - Komprenante ke la venonta I.J. Kongreso en Vraca, Bulgarujo pligrandigas la problemon, la estraro akordis delegi reprezentanton al la 7ª Internacia Seminario (Germanujo).Dato: 27-12-1963 ĝis 2-1-1964

3 - Pri tio ke la okazigo de la Universala Kongreso de la jaro 1964 okazos en Nederlando kaj supozante ke la I.J.Kongreso de TEJO,ankaŭ okazos en la sama lando ni ekde nun decidas ankaŭ delegi reprezentanton al la menciita aranĝo.

4 - Ciuj membroj kiuj deziras reprezenti nian sekcion en la menciita seminario kaj kongreso,bonvolu skribi rekte al la redakcio,indikante la jenon: nomoj, jaraĝo,profesio,adreso,kaj sekso. (Kompreneble oni devas scipovi Esperanton,ĉar post la vojaĝo devas prezenti raporton)

5 - Ni malfermas apartan fondaĵon "INTERNACIA REPREZENTANTO" en kiu enkasigos la gajnoj de la anoncaj paĝoj kaj privataj donacoj.(Kalkulante proksimume la elspesojn de la restado en I.J. Kongreso en Nederlando pli mal-pli 1500 pesetoj kaj eble por la 7ª Internacia Seminario sama kvanto oni akordis la 6- punkton por atingi la necesajn monrimedojn.

6 - Rememorante la malfacilaĵojn,kiujn havis la estraro por elekti la reprezentantinojn okaze de la Eksperimento-Foruno de Romo, la estraro klarigas ke nur unu membro povas partopreni al la 7ª Internacia Seminario, kaj alia al la I.J. Kongreso, Por la elekto de la du reprezentantoj(inoj) oni organizos LOTADONJ. Por partopreni la LOTADONJ, estos necese aboni duoblan kotizon,anstataŭ 60 pesetoj,oni devas pagi 120 pesetojn.Tiel do okazos du lotadoj,unu por la 7ª I.S. kaj alia por la I.J.Kongreso. La Lotado pri la 7ª I.S. okazos dum la 2ª Hispana Esperanto Junulara Kongreso.

-o-o-o-o-o-o-o- La Estraro

# RAPORTO PRI LA AGADO DE JUNULARAJ LANDAJ ORGANIZOJ

Parto de la Raporto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo T.E.J.O. en la laborjaro 1961-1962

---

Junularo Esperantista Brita JEB.

Aliĝis al T.E.J.O. em 1959. Junularaj Rondoj 10. Membroj:127 junaj membroj de BEA,86 individuaj membroj,entute 213.JEB.gvidas energie sekretarian laboron,eldonas propran dumonatan gazeton "Kial NE "?" kaj sekretarian monatan bultenon.La tre tragika morto de Kerrin Masterman, la novelektita sekretario de JEB,kaŭzis grandan malfacilaĵojn,tamen nova estraro tre kuraĝe transprenis la organizan laboron kaj entreprenas gravan informan agadon ĉe la gazetaro.JEB.okazigis 3 Semajnfinajn renkontiĝojn kun meza nombra 20 partoprenintoj,1 komitatan kunvenon kaj preparis la 17-an IJK.

Bulgara Esperanto Junulara BEJ

Aliĝis al T.E.J.O. en 1956 kiel Junulara Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio,ŝanĝis sian nomon laŭ decido de la Junulara Kunveno dum landa E-Kongreso 16-7-62. Membroj:ĉirkaŭ 1000,Junularaj Rondoj 19. B.E.J. okazigis III Tutlandan Esperantistan Junularan Balon en Ruse,aprilo 1962 kun 1600 partoprenintoj,kaj somere ekskursojn al aliaj landoj.B.E.J. invitis la 19-an I.J.K. de T.E.J.O. por 1963 al Vraca.

Junulara Esperantista Franca Organizo J.E.F.O.

Aliĝis al T.E.J.O. kiel F.E.J. en 1956,en 1959 praktike ĉesis ekzisti,refondiĝis kiel J.E.F.O en 1961

Germana Esperanto Junularo G.E.J.

Aliĝis al T.E.J.O. en 1956.Membroj proksimume 210.La iniciatema nova estraro reorganizas strukturon de G.E.J. laŭ la administra sistemo de sia lando,Redaktas sperte propran parton en "Germana Esperanto-Revuo" En 1961 organizis 5-an Internacian Seminarion pri numtempaj politikaj demandoj 7-an Internacian Junular-Kunvenon en Oberkirch kaj sian landan kunvenon, Kunlaboras kun neesperantistaj jun. org., starigas diversajn fakojn kaj komencas kunlaboron kun aliaj Landaj Sekcioj.

Itala Esperanto Junularo I.E.J.

Aliĝis al T.E.J.O. en 1956. Membroj 137,Nombro de Junularaj Rondoj, ne konata.I.E.J. ne havas partan centran estraron sed nur Komisiistoj pri diversaj fakoj.Laŭ elekta kunsido de I.E.J. en Sanremo 26-9-61 I.E.J. havas sian paĝon "Nova Sento" en la organo de I.E.F.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio J.E.J.A. 
Aliĝis al T.E.J.O. en 1958.Laŭ nombro de membraro la plej forta sekcio de T.E.J.O. Membroj 5000, el kiuj al U.E.A oni pagas po 1000,Junularaj Rondoj ĉirkaŭ 100,La 2-5-62 en Palib okazis la 2-a Jarkunveno de Jugoslavia E- Junularo,kiu elektis novan asocian komitaton kaj estraron,J.E.J.A. kunlaborante kun neesperantistaj organizoj,fariĝas amasa organizaĵo.Eksteraj rilatoj tre malfortaj.

Pola Esperanto Junularo : P.E.J.
Aliĝis al T.E.J.O. en 1958.Membroj ĉirkaŭ 600.Junularaj Rondoj 10.La 4-a Kunveno de P.E.J. grupiĝis pli ol 300 partoprenintoj kaj daŭris tri tagoj.La Komitato laboras en 7 fakoj gvidataj de la Estraranoj, kiuj kunvenas 4-foje en jaro,eldonas monatan gazeton "Tamen"

Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo S.E.J.U.
Aliĝis al T.E.J.O. en 1956,reorganiziĝis dum jarkunveno en 1962.Membroj 100. Junularaj Rondoj 6.Em 1961-1962 okazis du estrarkunvenoj.S.E.J.U. eldonas propran bultenon,"Kvinpinto" kaj preparis la 18-an I.J.K. de T.E.J.O.

Junularo Esperantista de Nordameriko J.E.N
Momente ne aliĝis al T.E.J.O.Membroj ne konata, Eldonas propran bultenon kaj organizas Piknikojn

Sekcio de Junuloj de Esperantista Asocio de Madagaskao
La plej nova sekcio aliĝis al T.E.J.O. en 1961.Membroj 26, ĉiuj el Tananarivo.

Hispana Esperanto Junulara Sekcio H.E.J.S.
Aliĝis al T.E.J.O en 1959 kiel Junulara Sekcio de Hispana Esperanto Federacio.Membroj: ĉirkaŭ 350. Abonantoj al la bulteno eldonita de H.E.J.S nur 120 membroj: Nombro de grupoj 7 nome:Barcelono, 40 membroj, Madrido 150 membroj Manreso. 11 membroj, Moyá 11 membroj,Sabadell, 43 membroj, Tarraso 50 membroj, kaj Valladolido 25 membroj. La redakcio ne kredas necese longigi ĉi-raporton,ĉar la legantoj de nia bulteno povas konstati la lastajn aktivecojn de nia sekcio per ĉi bulteno. Grava afero estos nia 2ª Hispana Esperanta Junulara Kongreso.Malgraŭ ke ni informis ke ĝi okazos en Tarrasa.eble ni organizos ĝin en Barcelono en la Kadro de la venonta 23-a Hispana Kongreso de Esperanto.Tiamaniere ni povos festi pli bone la 5-jara datreveno de la fondiĝo de H.E.J.S. Tiucele la estraro antaŭ decidi kia urbo estas plej adekvata,petas al la membroj bonvolu proponi al ni siajn decidojn.Antaŭdankon.

La Estraro.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

EKSKURSA FAKO

La 23ª de Septembro kiel jam estis anoncita en H.E.J.S. bulteno okazis la ekskurso tra la belaj ĉirkaŭaĵoj de la montoj " POLA kaj L'OBACH ".

Por efektivigi ĝin renkontiĝis en Tarraso gesamideanoj el Barcelono, Manreso kaj Tarraso. En tiu ĉi urbo ni prenis aŭtobuson kiu kondukis nin al " LA BARATA ".

Post la alveturado kaj reciprokaj prezentadoj gaje ni ekkomencis la piedsupreniradon, forlasante post ni la ŝoseo, malantaŭ nia irado, turnigante la kapon oni povas trarigardi la ampleksan naturajn reliefajn rokojn kiu kiel ŝtono zono ĉirkaŭbrakas kaj subtenas kiel bazo la monton "SANT LLORENÇ DE MUNT " limo de Vallés kun Pla de Bages jam de longe konata de ni en forpasintaj ekskursoj.

Post unu horo ni atingis la ĉiam dezirata fonton "POLA" bela restadejo kaj ebligata haltejo de trapasantaj ekskursistoj. Tie rigardante la pitoreskan vidindaĵojn oni tempopasis, sane kaj kun apetito ni matenmanĝis.

Ĝis tie ni estis akompanataj de nia altestimata samideanoj Sro. Moya el Tarrasa kaj Sro. S. Llorens samurbanoj.

Eta nebulo kiel milda silka vualo kovris la monton Montserrat kaj ties ĉirkaŭaĵojn, tamen tio ne malhelpis al ni la longdaŭran rigardadon el la ĉarma pejzaĝo el "Pla de Bages" atendiĝanta antaŭ niaj allogitaj okuloj; sed la tempo forkuras rapide, la vetero estas belega kaj la agrabla temperaturo invitas nin daŭrigi la piediradon. Tiamaniere, baldaŭ ni forlasis malantaŭe la kompaktajn kaj aglomeraciajn rokojn de la "Pola" kaj "Queixal del Porc"; dekstre, iom malsupre restas la "Paller" kiel eterna gardostaranto.

-O-O-O-O-O-O-O-O-O-

La estraro deziras al ĉiuj "GAJAN KRISTNASKON kaj FELIĈAN NOVAN JARON".

-O-O-O-O-O-O-O-O-

Tra densa pinarbaro kies forta aromo odorigas la aeron, parto kovrita parte kaŝita de verdaj kverkoj, korkokverkoj, rosmorenoj k.a. vegetaĵoj, serpentumas bojeto kiu ravigis nin ĝis ni atingis la mildan monteton kaj kampodomon "L'Obach" celo de nia ekskursado.

Post ĝrenado laŭ la individua deziro konfortan teran sidlokon, nia kara kamarado Aragay informis nin detale pri ĉefaj aferoj pritraktitaj dum la pasinta Kongreso en Valladolid koncerne al H.E.J.S. same tiel ankaŭ pri fondiĝo en nia lando de novaj H.E.J.S. grupoj, krom pri nacia kaj fremda agado.

Tuj sekve F-ino. Magencia Garcia reprezentantino de la junulara grupo kiu partoprenis la "Eksperimento" Romo, kaj je la nomo de ŝiaj kamaradinoj prezentis al ni ampleksan kaj agrablan raporton pri la neforgesebla restado en Italujo.

Denove S-ano. Aragay la senĉese cerbumanta Aragay ( oni povas nomi lin tiel) distris al ni uzante interesan laŭdindan kaj ....... kiel ne diri tion ankaŭ profiteblan ludmetodon: tion povis konstati ĉiuj el ni. Oni povas certigi ke tiu sprita ludo estis laŭdate kaj ĝoje akceptata de la partoprenintoj.

Finfine venis la horo "malŝarĝigi la tornistrojn", do ni tagmanĝis sed oni ne povis siesti, ĉar post la tagmanĝo vekiĝis la ludemo kaj ŝercemo de la grupo. Niaj ĉarmaj akompanantinoj senĉese montris senliman ruzecon kaj kapablon viktimigi nin "najvaj Adamoj "per ludoj kaj ŝercoj......

Denove kun malĝojo en la koro ni atendis sur la ŝoseo la alvenon de la prahistoria aŭtobuson per kiu ni devis veturi al Tarrasa kie la grupo disiĝis post ne forgesebla tago pasigita en gaja esperantista etoso kamaradeca.

Nia andiaŭo estis alvoko por alia kunestado: ĝis revido !.

C. BELLO

POŜTKARTVESPERO

Esperanto Grupo Moya str. Forn 12, Moyá (Barcelono) Hispanujo, okazigos ĝin meze de februaro 1963 por progresigi la 30 novajn gekursanojn, preskaŭ ĉiuj gejunuloj.
Skribu amase.

-o-o-o-o-o-o-o-

" ACLARIMENTS LINGÜISTICS "

Ni tre ĝojas informi al ĉiuj pri tiu-ĉi verko "Aclariments lingüistics" de nia eminenta P-ro kaj akademiano Delfí Dalmau.

La libro estas verkita, tre diligente kaj saĝe kiel siaj famaj prelegoj, okaze de la naciaj kongresoj. Certe ĝi estas tre interesa por la esperantistaro ĉar la ideoj de la aŭtoro pri la lingvoj lumigas la aktualan lingvan problemon. Estas verkita katalunlingve; enhavas 56 paĝojn. Ĝia prezo estas tre malmultekosta, 25 pesetoj kaj pro tio tre akirebla. Bonvolu peti ekzemplerojn al Pro Delfí Dalmau str. Lauria 98, Barcelono -9, aŭ rekte al la Redakcio.

-o-o-o-o-o-o-o-

GRAVA ERARO

En la pasinta numero de nia bulteno aperis serioza preseraro, nome: "Ĉu naciismo servos internaciismo?".
Ankaŭ en la revuo "Esperanto" (UEA) la koncerna titolo: "Ĉu naciismo venkos internaciismo?", estas erara.
Oni devas legi: "ĈU NACIISMO SEKVOS INTERNACIISMO?".

-o-o-o-o-o-o-

EKSKURSA FAKO

Pasinta ekskurso.- Oktobro, tago 21-an. Tra la montaro Montserrat. Pro la malbona vetero, la vagonaro ne funkciis bone, pro tio la grupoj de Barcelono kaj Manreso ne renkontiĝis; tiel do, en la sama tago kaj montaro okazis du ekskursoj.

Partoprenintoj. El Manreso: P. Palá, Antonio Tomasa kaj sia fianĉino, P. Gili kaj Carmelo Bello, el Barcelono. José Girona kaj sia fianĉino, Salvador Aragay kaj Josefino Girona de Aragay

-o-o-o-o-o-o-o-

## GRAVA SUKCESO

En la mirinda revuo " EL CORREO " de novembro eldonita de UNESCO ĝojis nin legi en Esperanta lingvo, leteron en la sekcio, "La legantoj skribas nin". Nia entuziasmo pligrandiĝis kiam ni konstatis ke la genia ideo estis de nia konulo, la samideano Juan Vèlez, ano de HEJS kaj regula kunlaboranto de la Redakcio.

Lia lasta artikolo verkita por HEJS estis "Skisoj pri la kinarto de Ingman Berman", sendube vi tre bone rememoras ĝin ĉar poste, aperis pliaj artikoloj pri la sama temo.

Sekve ni publikigas la leteron aperíta en "El Correo"

Ricevu mian humilan, sed sinceran kaj tutkoran gratulon pro la ĉi dumonata numero de "El Correo de la Unesco"-revuo.

La terura problemo,kiun oni komentadas kaj samtempe studas amplekse en tiu interesa revuo,lasos sendube grandan influon en ĉiujn personojn,kiuj tutlande legos ĝin.

Certe ke tiu ĉi numero,"La luktado kontraŭ la malsato "kauzigos profundan impakton en ĉiujn konsciencojn.Mi certigas ĉi tion meditante la vortojn de Tibor Mende, kiuj aperas en aparta loko sub la titolo: "La Humillación".

Ankaŭ gratulojn pro la altega kultura kaj humana nivelo de via revuo kaj pro la senlaca agado de Vi kaj viaj kunlaborantoj por tiom bela kaj dankinda misio,celante la vekadon kaj feliĉon de Homaro.

Kun antaŭdankoj,salutas Vin atente

J. Velez
Barcelona Hispanujo

Ni profitas ĉi okazon por varme rekomendi al niaj legantoj la aĉetadon de la revuo "El Correo" de UNESCO, ĉar ni konstatas ke ĝi estas unika ne nur pro la riĉa,sed ankaŭ pro la lerta, saĝa kaj utila ideoelmontrado.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

ULTIMA INFORMACION

Este número del boletín será enviado contra reembolso a algunos esperantistas que no son socios de H.E.J.S.

Nos ha movido obrar de esta forma, la cual puede parecer atolondrada, el deseo de permitir a cuantos esperantistas lo deseen, abonarse a nuestro boletín con las mínimas molestias, y a la vez dar a conocer nuestra información no tan sólo a los jóvenes, sino también a los veteranos del esperantismo.

Hacemos constar que, las personas que paguen el mencionado reembolso, serán consideradas automáticamente socios de H.E.-J.S. y recibirán gratuitamente los boletines del próximo año 1963.

En nombre de la Junta y de todos los asociados, agradecemos de antemano a todos los esperantistas que desinteresadamente han aceptado nuestro boletín, demostrando de esta manera que se unen a nuestro diario quehacer, para lograr la máxima divulgación del Esperanto.

La Junta desea a todos los nuevos asociados y a los socios, un Feliz Año Nuevo.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Zamenhof. "El Esperanto es la universalización científica y racional de los idiomas más cultos y evolucionados del mundo"
A.Meillet." Toda discusión teórica es vana. El Esperanto funciona."

-o-o-o-o-o-o-o-o-

C

MADERAS

CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24

BARCELONA (14)

Hornos Lloyd Industrial, S. A.

Hornos para templar, forjar, recocer, revenir y fundir

Quemadores, Compresores y Electroventiladores

Fábrica: Navarra, 19
Teléfono 223 99 10
Calle Aragón, 158
Teléfono 253 32 07

BARCELONA

ZURCIDORA

y

TEJEDORA

Sans, 292, bajos
BARCELONA

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 230 00 62
HOSPITALET - BARCELONA

SUMINISTRO INDUSTRIALES

RECAMBIOS TEXTILES

# C. I. CASADESUS, S. A.

*Manresa*

CTRA. CARDONA, 6

TEL. 3417

*Barcelona*

VALENCIA, 160-162

TEL. 253 79 85

Correas y Poleas Trapezoidales

Variadores, Reductores de Velocidad

Embragues de fricción

Rodamientos a bolas y rodillos

MOTORES ELECTRICOS


T. G. Hija de I. García - M. de la Rosa, 38 - Barna.-12